

LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 8, **nummer 6 (48)**, marto-aprilo 2016

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj: la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 8, n-ro 6 (48): marto-aprilo 2016

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

*Ĉar mi ne plu povis trovi la libron kun
rusaj rakontoj, el kiu mi transprenis la unuan
parton de la rakonto 'La fatalisto' de la rusa
fama aŭtoro Lermontov, mi komencas nun
publikigi alian, faman rakonton - La Perlo - de
la usona aŭtoro John Steinbeck. Temas pri
malriĉega indiana plonĝisto, kiu trovas sur la
marfundo escepte grandvaloran perlon, kiu
kaŭzas al li multan mizeron pro la avideco kaj
maliceco de aliaj homoj.*

Pieter Jan Doumen

Eŭropa Unio kaj Esperanto

(De Europeese Unie en Esperanto)

**Esperantaj organizaĵoj pri la eŭropa
lingvo-politiko**

Eta superrigardo

Estis suface kompreneble, ke jam frue post
la komenco de la integriĝo, la eŭropaj esperan-
tistoj interesiĝis pri la lingva komunikado kaj
vidis certan ŝancon por E-o, proponante sian
lingvon.

En 1965 en Vieno okazis la unua Eŭropa
Esperanto-Konferenco, dum la unua Eŭropa
Esperanto-Kongreso okazis en 1976 en Eindh-
hoven (Nederlando).

Tra la jardekoj oni fondis komisionojn, klu-
bojn, organizaĵojn kaj instituciojn, kiuj okupi-
ĝis pri eŭropaj temoj kaj klopodis lobii por Eo.
Sen detalo menciindas i.a.:

- la Eŭropa Komisiono de UEA,
- la Eŭropa Klubo (1974) kun ĝia bulteno
Eŭropa Dokumentaro;
- la Akademio Internacia de Sciencoj de San
Marino (AIS, multaj studoj pri la lingvistika
aspekto, eŭrologio);
- la Laborgrupo pri la Lingvoproblemo en EU;
- la Asocio pri Eŭropa Konscio;

- la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU);
- La itala Radikala Partio klopodis agadi pere
de sia 'radikala esperanta asocio'.

Lastatempe fondiĝis la kvazaŭpolitika partio
'Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE), kiu
dum la balotoj por la Eŭropa Parlamento en
2009 en Germanio ricevis sume 11.859 voĉojn
kaj en Francio 29.263.

Necesus aparta analizo, ĉi tie ne farebla, por
prezenti la multajn aktivaĵojn de la menciitaj
organizaĵoj (i.a. aranĝoj, publicaĵoj, ekspozi-
cioj, kontaktoj kun EU-institucioj ktp.).

La unuopaj organizaĵoj aktivadis dum mal-
samaj tempoj kaj ne ĉiam kunordigite.

UEA daŭre membras en la *European Lan-
guage Council* kaj laŭeble partoprenas en ties
konferencoj, atentigante pri la diskriminaciaj
traĵtoj de la nuna lingvopolitiko de EU. Komi-
siitoj de UEA kaj/aŭ de EEU ankaŭ agadas en
eŭroptemaj landaj aranĝoj, kaj tie levas lingvo-
politikajn demandojn, ekz. kadre de la ekono-
miaj forumoj en la pola urbo Krynica, aŭ en
aranĝoj de la Unio de Eŭropaj Federistoj kaj
respektivaj eŭropaj landaj organizaĵoj.

Lingvopolitikajn demandojn EEU kaj UEA
ofte traktis kune kun aliaj organizaĵoj, ankaŭ s
kadre de apartaj konferencoj, kiel ekzemple en
2006 en Bratislavo pri la perspektivoj de la lin-
gvopolitiko kaj lingvaj rajtoj en Eŭropa Unio.
Menciindas la Nitobe-simpozioj, organi-zataj
de la Centro de Esploro kaj Dokumentado
(CED) pri mondaj lingvaj problemoj kaj *Espe-
rantic Studies Foundation* (ESF). Aparte grava
estis la kvara Nitobe Simpozio post la 90-a UK
(2005) en la litova parlamentejo en Vilno pri
"Lingvopolitikaj aspektoj de la ampleksigo de
Eŭropa Unio".

La kunlaboro de esperantistoj kun tradiciaj
politikaj partioj ĝis nun ne estas rezultodona.
Tamen foje ekzistas certaj atingoj, ekz. ĉe la
germana Partio de la Verduloj, kiu en sia
programo por eŭropo rezoluciiis i.a.:

"... Kultura multeco estas vivanta, kaj oni ne
rajtas redukti ĝin al la protekto de merkataj
nomoj kiel Camembert, Feta, Hallomi. La bazo
kaj esprimo de la kultura multeco estas la lin-
gvoj de Eŭropo, ne sole la lingvoj de la plimul-
to-socioj, sed ankaŭ de la minoritatoj kaj kro-
me Esperanto kiel internacia lingvo de inter-
popola komunikado. Plulingveco estas forte
subtenenda..."

La Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

Post diversaj antaŭŝtupoj (ekz. la Eŭropa
Esperanto-Centro) en 1977 fondiĝis la jam
supre menciita Eŭropa Esperanto-Unio (EEU),

kunlabora organizaĵo de la landaj asocioj de UEA. Ĝi aktivas en esperantistaj kaj neesperantistaj medioj, interalie en EU.

Pri la abunda agado informas la retejo de EEU <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>.

EEU okazigas aranĝojn kadre de la Univerŝala Kongresoj, organizas specialajn kongresojn (foje kune kunlandoj asocioj), klopodas kunlabori kun EU-instancoj, kunagadas en nacilingvaj eŭroptemaj aranĝoj kaj konferencoj kaj eldonas retan publikaĵon, la Eŭropan Bultenon (EB), kiu sisteme informas pri la agado de la organizaĵo. La aktualan laboron grave helpas i.a. la pola parlamentano Margareta Handzlik kaj la profesiaj diplomatoj Seán Ó Riain (Irlando), prezidanto de la EEU, kaj Jozef Reinart (Slovakio), ĉiuj spertaj esperantistoj.

Kelkaj malmultaj ekzemploj:

- Ekzpozicio en 2008 en la Eŭropa Parlamento en Bruselo, “Junularo en Interkultura Dialogo: per kio povas kontribui Esperanto?”
- Informoj pri la UK en Roterdamo 2008 al ĉiuj EU-parlamentanoj (732 personoj).
- Informoj al la parlamentanoj pri la lingvopolitika ekonomika raporto de prof. François Grin (septembro 2009).

Okaze de la 150-a datreveno de la naskiĝo de Dr. Zamenhof, Margaretha Handzlik aranĝis renkonton de delegacio de EEU kun la prezidanto de la Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek, eksĉefministro de Pollando. Buzek aparte interesiĝis pri la ebla kontribuo de la kantado de la Eŭropa Himno en neŭtrala lingvo kiel Esperanto por plifortigi la eŭropan identecon en harmonio kun la naciaj kaj regionaj identecoj, kaj por la kreo de emocia ligo inter EU kaj ĝiaj civitanoj en la 27 diversaj landoj.

Informoj al ĉiuj EU-parlamentanoj (nun 751 personoj, post la efektiviĝo de la Traktado de Lisbono), pri la rekomendoj de la “Civitan-socia platformo por promocio multlingvismon” kaj pri la ebleco uzi la novan EU-civitanan iniciaton, kiu ekfunkciis en aprilo 2012, por ke EU konsideru la oficialigon de la kantado de la eŭropa Himno en Esperanto.

EEU ankaŭ lerte partoprenas en diversaj EU-projektoj, EU-programoj kaj aliaj iniciatoj, parte eĉ kun financa subvencio.

Kelkfoje EEU prezentas proprajn projektojn, kiujn EU financas, ekz. la projekton “Kiel aspektus Eŭropo se EU ne ekzistus?” (Konferenco de la 9-a ĝis la 11-a de majo 2012 en Triesto)

Foje EEU aranĝas pritemajn konferencojn. Tiel ekzemple 25 kaj 26.8.2008 kun la Itala

Esperantofederacio en Grosseto: “Estonteco de la ideo de Eŭropa Identeco”; 10.12.2008 en Bru-selo: “Dulingva kaj multlingva edukado”.

Reprezentantoj de EEU sole en 2008 partoprenis en pli ol 30 aranĝoj de EU aŭ prelegis pri eŭroprilataj temoj. Entute la priagadaj jar-raportoj de EEU montras mirindan kaj multflankan aktivecon.

Kelkfoje la aktivuloj de EEU sukcesis akiri financajn subtenojn de EU por difinitaj aranĝoj, aŭ, kvankam nur partatempe, eĉ por oficejo (gvidas Maja Tišljar).

(*La Gazeto*, no. 160)

Novajoj en Esperantujo

Francio: *Francaj kasteloj kaj rezidejoj* -

Post la sukcesa ekskurso antaŭ la UK de Lillo, Catherine Kremer kaj Jannick Huet proponis al la esperantistoj, novan turisman programon en la Luar-valo de la 12-a ĝis la 17-a de junio 2016. Ili vizitos kun profesia ĉiĉeronado en Esperanto ne nur famajn renesancajn kastelojn, sed ankaŭ rezidejojn de famaj verkistoj: Ronsard, Rabelais, Balzac kaj Leonardo da Vinci.

Aliĝu nun al nia turisma semajno en junio 2016 per www.gresillon.org/sl. Atentu: la kastelo de Grésillon havas malmulte da unutilitaj ĉambroj. Do ne prokrastu vian aliĝon, se vi deziras tian ĉambron!

Novajo: por facile atingi Grésillon: flugo de la British Airways el London City (LCY) al Angers Loire (ANE) lundon la 13-an de junio por nur 76 £. La flughaveno situas je 15 km de Grésillon, kaj ni povos veturigi vin.

Koran bonvenon en la Esperanto-Kastelo!

Jannick Huet

Hungario: *Nova redaktoro por Esperanto*

El ses kandidatoj por sukcedi al Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo Esperanto, la estraro de UEA elektis la 47-jaran Attila Kaszás. Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politikologo kaj laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj manaĝisto.

Lerninto de la fama kvintaga “Piratfiŝkurso” en 1987, Attila Kaszás tuj aliĝis al la Esperantofako de la Universitato ELTE de Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 90-aj jaroj. Estrarano de Hungara E-Junularo kaj TEJO, ki kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn, rolante kiel LKK-prezidanto de la 55-a IJK. Dum renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humorajn

skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis E-familion, en kiu naskiĝis unu filo.

Profesie Kaszás laboris ĉe registaraj instancoj, NRO-oj kaj komercaj entreprenoj en diversaj kampoj kiel ekz. junularpolitiko, ekologia mastrumado kaj internaciaj rilatoj. Li nun faras doktorajn studojn pri elektronika demokratio. Membro de la hungara UNICEF-komisiono kaj estrarano de la Asocio de Eŭropaj Baloto-Spertuloj, li krome ellernis pro pasio dek kvar lingvoj ĝis nun, kaj multe vojaĝis, entute en pli ol kvardek landoj.

Kaszás transprenos la redaktadon de la revuo Esperanto ekde la ĉi-jara maja numero. “Dum la lastaj semajnoj mi konstante cerbumas pri la revuo. Mi estas plenaj je ideoj, temoj, rubrukoj, artikolopianoj”, li entuziasme skribis. Jam en marto li planas viziti la Centran Oficejon en Roterdamo por konatiĝi kun la kolegoj tie.

Ret-info@eventoj.hu

La Perlo (De Parel) de John Steinbeck

En la urbo oni rakontas la historion de la granda perlo – kiel ĝi estis trovita kaj kiel ĝi denove perdiĝis. Oni rakontas pri Kino, la fiŝisto, kaj pri lia edzino Juana kaj pri la bebo Kojotito. Kaj ĉar la historio estis rakontata tiel ofte, ĝi radikiĝis en la menso de la homoj. Kaj kiel en ĉiuj rerakontataj historioj, kiuj estas en la koroj de la homoj, en ĝi estas nur nigraj kaj blankaj aferoj kaj bonaj kaj malbonaj eventoj kaj nenio griza aŭ mezbona ie ajn inter ili.

Se tiu ĉi historio estas parabolo, eble ĉiu homo vidos en ĝi sian propran signifon kaj legas en ĝi sian propran vivon.

Ĉiakaze oni rakontas en la urbo ke...

I

Kino vekigis en la krepusko. La steloj ankoraŭ brilis, kaj la tago kolorigis nur malfortan strekon de lumo kontraŭ la malalta orienta horizonto. La virkokoĵ jam kantis dum kelka tempo, kaj la fruaj porkoj jam komencis sian senfinan serĉfosadon inter branĉetoj kaj lignopecetoj por vidi; ĉu ili preteratentis ion manĝeblan. Ekster la branĉkabano en la arbogrupo aro da malgrandaj birdoj ĉirpadis klakante per siaj flugiloj

Kino malfermis siajn okulojn kaj unue rigardis la lumigitan kvadratan, kiu estis la pordo,

kaj tiam la pendantan skatolon, en kiu dormis lia fileto Kojotito. Kaj laste li turnis la kapon al Juana, sia edzino, kiu kuŝis ĉe lia flanko sur la mato, kun sia blua ŝalo sur la nazo kaj brus-toj kaj ĉirkaŭ la lumboj. Ankaŭ la okuloj de Juana estis malfermitaj. Kino ne povis memori, ke ili iam estis fermitaj, kiam li vekigis. Ŝiaj malhelaj okuloj similis steletojn. Ŝi rigardis lin, kiel ŝi ĉiam faris, kiam ŝi vekigis.

Kino aŭdis la dolĉan plaŭdadon de la matenaj ondoj sur la strando. Tio estis tre bona, kaj li refermis siajn okulojn por aŭskulti sian muzikon. Eble nur li faris tion, sed eble ĉiuj membroj de sia popolo faris tion. Iam lia popolo estis granda faristo de kantoj, tiel ke ĉio kion ili vidis, pensis, faris aŭ aŭdis fariĝis kanto. Tio okazis antaŭ tre longe. Sed la kantoj restis. Kino konis ilin, sed neniam novaj kantoj estis aldonataj. Tio ne signifas, ke ne estis personaj kantoj. En la kapo de Kino nun estis kanto, klara kaj dolĉa, kaj se li kapablus paroli pri ĝi, li nomus ĝin la kanto de la familio.

La litkovrilo kovris lian nazon por protekti lin kontraŭ la malagrabra matena aero. Liaj okuloj turnigis al susurado ĉe lia flanko. Estis Juana, kiu ekstaris preskaŭ senbrue. Per ŝiaj duraj, nudaj piedoj ŝi iris al la pendanta kesteto, en kiu dormis Kojotito. Ŝi klinigis super ĝin kaj diris amoplenan trankviligan vorton al li. Kojotito rigardis ŝin momenton, refermis siajn okulojn kaj reekdormigis.

Juana iris al la fajrotroo, malkovris ankoraŭ brulantan lignopecon kaj ventumis ĝin, dum ŝi rompis malgrandajn branĉopecojn super ĝi.

Nun Kino ekstaris kaj volvis sian kovrilon ĉirkaŭ sian kapon kaj ŝultrojn. Li metis la piedojn en siajn sandalojn kaj iris eksteren por rigardi la tagigon. Ekstere li ekkaŭris ĉe la pordo kaj tiris la finaĵojn de sia kovrilo super siajn genuojn. Tiam li rigardis la nubetojn super la Golfo, kiuj flamis alte en la ĉielo. Kaprino proksimiĝis al li, prisnufis lin kaj fikse rigardis lin per siaj malvarmaj flavaj okuloj. Malantaŭ li la fajro de Juana ekflamis, sendis lumstrekojn tra la fendojn de la muroj kaj ĵetis moviĝantan lumkvadraton tra la pordon. Malfrua tineo enflugis al la fajro en la kabano. La familia kanto nun venis de malantaŭ Kino. Kaj la ritmo de la familia kanto estis la muelŝtono, per kiu Juana muelis la maizon por la matenaj kukoj.

La tagigo venis nun tre rapide: unue estis ia malforta lumo, tiam brilo kaj lumego kaj fine eksplodo de fajro, kiam la suno supreniris el la Golfo. Kino rigardis la grundon por protekti

siajn okulojn kontraŭ la forta sunlumo. Li povis aŭdi, kiel en la domo Juana platfrapis la maizkukojn kaj li flaris ilian riĉan odoron sur la kuirplato.

Formikoj rampis sur la grundo: grandaj nigraj bestetoj kun brilaj korpetoj, kaj ankaŭ malgrandaj, rapidaj helbrunaj formikoj. Kun la senemocieco de dio Kino observis malgrandan formikon, kiu provis eskapi el la truo, kiun fosis por ĝi granda formiko. Magra, timida hundo proksimiĝis al li kaj, post mallaŭta vorto de Kino, eksidis, buklis sian voston sur la antaŭajn kruojn kaj delikate metis sian mentonon sur la staketon. Estis nigra hundo kun orflavaj okuloj. Estis mateno kiaj estis ĉiuj aliaj matenoj, kaj tamen estis la plej bela el ĉiuj matenoj.

Kino aŭdis la sonon de la kordo, kiam Juana prenis Kojotiton el lia pendanta kesteto, purigis lin kaj metis lin en la hamakon de sia ŝalo proksime de siaj brustoj. Kino povis vidi tiujn ĉi agojn sen rigardi ilin. Juana mallaŭte kantis malnovan kanton, kiu havis nur tri notojn sed tamen senfinan variecon de intervaloj. Kaj tio ankaŭ estis parto de la Familia Kanto. Foje ĝi altiĝis al doloriga tono, kiu kuntiris la gorĝon, dirante, ke tio estas sekureco, tio estas varmo, tio estas sendanĝereco.

Ekster la ĉirkaŭbarilo estis aliaj dometoj fari-taj el branĉoj, kaj ankaŭ el ili leviĝis fumo kaj la sonoj de matenmanĝo. Sed tiuj estis aliaj kantoj, iliaj porkoj estis aliaj porkoj, iliaj edzinoj ne estis Juana.

Kino estis juna kaj forta, kaj lia nigra hararo pendis super lia bruna frunto. Liaj okuloj estis varmaj, intensaj kaj brilaj, kaj liaj lipharoj estis maldensaj kaj krudaj. Nun li forigis la litkovrilon de sia nazo, ĉar la malluma, venena aero malaperis, kaj la flava sunlumo falis sur la domon. Apud la ĉirkaŭbarilo du virkoko-klinis la kapojn unu al la alia kaj defiis unu la alian kun disetenditaj flugiloj kaj rekte starantaj kolplu-moj. Sekvis mallerta lukto: ili ne estis batal-kokoj. Kino observis ilin dum momento, kaj tiam li levis siajn okulojn al svarmo da sovaĝaj kolomboj, kiuj flugis enlanden al la montetoj. La mondo nun estis vekiĝinta. Kino ekstaris kaj eniris la kabanon.

Kiam li eniris tra la pordo, Juana ekstaris de la fajrotroo, remetis Kojotiton en sian pendantan kesteton, kaj tiam ŝi kombis siajn nigrajn harojn, plektis ĝin en du plektaĵojn kaj ligis la finijojn per verdaj rubandetoj.

Kino eksidis apud la fajro, rulvolvis varme-gan maizkukon, trempis ĝin en saŭcon kaj

manĝis ĝin. Tiam li trinkis iom da pulko¹, kaj tio estis lia matenmanĝo. Estis la sola matenmanĝo, kiun li iam ricevis, escepte okaze de festoj kaj unu nekredbla festo de kuketoj, kiu preskaŭ mortigis lin. Kiam Kino finis sian matenmanĝon, Juana reiris al la fajro kaj prenis sian matenmanĝon. Ili parolis nur unufoje, sed ne necesis paroli, kiam temis pri kutimo. Kino ruktis pro kontenteco – kaj tio estis la tuta kon-versacio.

La suno varmiĝis la kabanon, enirante tra ĝiaj fendoj per longaj lumstrekoj. Kaj unu el la strekoj falis sur la pendantan kesteton en kiu kuŝis Kojotito kaj sur la ŝnuroj kiuj tenis ĝin.

Malgranda movo tiris iliajn rigardojn al la pendanta kesteto. Kino kaj Juana rigidiĝis en siaj pozicioj. Skorpio malrapide moviĝis malsupren laŭ la ŝnuro per kiu la kesteto de la bebo pendis de la tegmento. La pikilo de ĝia vosto etendiĝis rekte malantaŭ ĝi, sed ĝi povis stariĝi en momento.

La spiro de Kino siblis tra liaj naztruoj kaj li malfermis la buŝon por haltigi ĝin. Kaj tiam lia terurigita rigardo kaj la rigideco de lia korpo malaperis. En lian menson venis nova kanto, la Kanto de la Malbono, la muziko de la malamiko, de iu malamiko de la familio, sovaĝa, sekreta, danĝera melodio, kaj sub ĝi la Kanto de la Familio laŭte lamentis.

La skorpio moviĝis delikate malsupren laŭ la ŝnuro al la kesteto. Forte spirante Juana ripetis malnovegan magian vorton por protekti la bebon kontraŭ tiu malbono, kaj post tio ŝi murmuris inter siaj dentoj Saluton Maria. Sed Kino ekagis. Lia supra korpo moviĝis tra la kabano, sensone kaj rapide. Li levis siajn manojn kun malsupren turnitaj palmoj, dum liaj okuloj sekvis la skorpion. Malsuper ĝi en sia pendanta kesteto Kojotita ridis kaj levis maneton al la besteto, kiu sentis danĝeron, kiam Kino preskaŭ atingis ĝin. Ĝi haltis, ĝia vosto leviĝis super ĝian dorson per malgrandaj ektiroj, kaj la kurbigita pikilo brilis fine de la vosto.

Kino haltis. Li povis aŭdi kiel Juana denove murmuris la malnovan magiaĵon, kaj li povis aŭdi la malbonan Muzikon de la Malamiko. Li ne povis moviĝi ĝis moviĝis la skorpio, kiu serĉis la kaŭzon de la morto kiu venis al ĝi. La mano de Kino antaŭeniris tre malrapide kaj lerte. La vosto kun la pikilo leviĝis alte, sed ĝuste en tiu momento la ridanta Kojotito skuis la ŝnuron, kaj la skorpio falis.

¹ Meksika fermentinta trinkaĵo.

La mano de Kino moviĝis por kapti ĝin, sed la skorpio falis flanke de lia mano, falis sur la ŝultro de la bebo kaj pikis lin. Tiam Kino kaptis ĝin kaj pinĉis ĝin per siaj manoj ĝis ĝi estis nura pasto. Li ĵetis ĝin sur la grundon kaj frapis ĝin per la piedoj, dum Kojotito ekploris en sia liteto. Sed Kino batis kaj stamfis la malamikon ĝis ĝi estis nur fragmentoj kaj malseka loko sur la grundo. Liaj dentoj estis nudaj kaj kolero flamis en liaj okuloj, kaj la Kanto de la Malamiko roris an liaj oreloj.

Sed Juana nun havis la bebon en siaj brakoj. Ŝi trovis la pikon, kiu jam komencis ruĝiĝi. Ŝi metis siajn lipojn sur la trueton, suĉis tre forte kaj sputis kaj suĉis denove, dum Kojotito ploradis. Kino hezitis. Li estas senhelpa kaj ĝenas nur.

La kriado de la bebo altiris la najbaroj, kiuj tuj venis el siaj kabanoj – Juan Tomás, la frato de Kino, kun lia dika edzino Apolonia kaj iliaj kvar infanoj staris en la pordo kaj baris la enirejon, dum aliaj provis enrigardi, kaj malgranda knabo rampis inter la kruroj por povi vidi. Kaj tiuj kiuj staris antaŭe, transdonis tion kion ili vidis kaj aŭdis al tiuj kiu staris malantaŭe: «Skorpio pikis la bebon.»

Juana ĉesis suĉi la trueton de la piko dum momento. La malgranda trueto estis leĝere pligrandiĝinta kaj ĝiaj randoj estis blankiĝintaj pri la suĉado, sed la ruĝa ŝvelaĵo pligrandiĝis ĉirkaŭ ĝi, fariĝante pli dura limfatika vundeto. Kaj ĉiuj tiuj homoj eksciis pri la piko de la skorpio. Adulto povis fariĝi tre malsana de tia piko, sed bebo povis facile morti pro la veneno. Ili sciis, ke unue venas ŝvelaĵo, tiam febroy kaj fermita gorĝo, tiam konvulsioj en la stomako, kaj tiam Kojotito povis morti, se sufiĉa veneno envenis lian korpeton. Sed la doloro kaŭzita de la piko estis pasanta, kaj la krioj de Kojotito ŝanĝiĝis en ĝemadon.

Kino ofte miris pri la forta karaktero de sia pacienca, fragila edzino. Ŝi estis obeema kaj respektama kaj gaja kaj pacienca. Ŝi povis kurbigi sian dorson en naskopeno kun apenaŭ unu krio. Ŝi rezistis lacecon kaj malsaton preskaŭ pli bone ol Kino mem. En la kanuo ŝi estis kiel forta viro. Kaj nun ŝi faris la plej mirigan aferon.

«Venigu la kuraciston,» ŝi diris.

La vortoj estis transdonataj inter la najbaroj, kiuj staris dense kuniĝintaj en la malgranda spaco malantaŭ la branĉa ĉirkaŭbarilo kaj ripetis inter si: «Juana venigas la kuraciston.»

Venigi la kuraciston ĉi tien estis miriga, memorinda afero. La kuracisto neniam venis al la

kvartalo de la branĉodometoj. Kial li venus, se li havis pli da klientoj inter la riĉuloj ol li povis prizorgi, homoj kiuj loĝis en ŝtonaj domoj en la urbo?

«Li ne venos,» diris la homoj ĉe la pordo

«Li ne venos,» diris la homoj sur la placeto
Kino aŭdis tion kaj diris al Juana:

«Li ne venos.»

Ŝi rigardis lin per okuloj, tiel malvarmaj kiel tiuj de leonino. Kojotito estis la unua bebo de Juana kaj preskaŭ ĉio kiu gravis en ŝia mondo. Kino vidis ŝian rezolutecon, kaj la muziko de la familio resonis en sia kapo per ŝtalaj tonoj.

«Tiam ni iros al li,» diris Juana, kaj per unu mano ŝi aranĝis sian malhelbluan ŝalon sur la kapo, faris el unu finaĵo banton en kiu ŝi tenis la ĝemantan bebon kaj metis la alian sur lian vizaĝon por protekti lin kontraŭ la lumo. La homoj ĉe la pordo forpuŝis la aliajn kiuj staris malantaŭ ili por lasi ŝi eliri. Kino sekvis ŝin. Ili eliris tra la pordo al la sabla vojo, kaj la genajbaroj sekvis ilin.

La afero estis fariĝinta koncerno de ĉiuj genajbaroj. Ili formis malgrandan procesion, kiu iris al la centro de la urbo malantaŭ Juana kun la bebo kaj Kino, kaj malantaŭ ili Juan Tomás kaj Apolonia kun ŝia dika ventro, ŝanceliĝanta kun ĉiu streĉa paŝon, tiam ĉiuj najbaroj kun siaj infanoj, kurante ambaŭflanke de siaj gepatroj. Kaj la flava suno ĵetis iliajn ombrojn antaŭ ilin, tiel ke ili paŝis sur siaj propraj ombrojn.

Ili atingis la lokon, kie ne plu estis branĉaj kabanoj kaj komenciĝis la ŝtona urbo kun blankaj domoj, la urbo kun duraj eksteraj muroj kaj freŝaj internaj ĝardenoj kun gigantaj floroj, kiuj kovris la murojn per siaj purpuraj, ruĝaj kaj blankaj kronoj. Ili aŭdis la kantadon de enkaĝigitaj birdoj en la sekretaj ĝardenoj kaj la ŝprucadon de la refreŝiga akvo sur la grandaj slaboj. La procesio transiris la blindigantan placon kaj pasis antaŭ la preĝejo. Ĝi estis tre longa nun, kaj la ĵusalvenintoj estis mallaŭte informitaj pri tio, kiel la bebo estis pikita de skorpio, kaj ke la patro kaj la patrino nun portis ĝin al la kuracisto.

Kaj la nove venintoj, precipe almozpetantoj kiuj staris antaŭ la preĝejo kaj, estante grandaj ekspertoj pri financoj, rapide rigardis la malnovan bluan robon de Juana, vidis ŝian larmojn, taksis la verdajn rubandojn sur ŝiaj harplektaĵoj, legis la aĝon de la litkovrilo de Kino kaj la milfojan lavadon de liaj vestoj, kaj konkludis, ke temas pri tre malriĉaj homoj, kaj ili sekvis ilin por vidi kiel tiu dramo evoluos.

La kvar almozuloj antaŭ la preĝejoj sciis ĉion, kio okazis en la urbo. Ili studis la mienojn de la junaj virinoj, kiam tiuj ĉi iris al konfeso, vidis ilin kiam ili eliris, kaj divenis la specon de ŝiaj pekoj. Ili konis ĉiun malgrandan skandalon kaj kelkajn grandajn krimojn. Ili dormis en siaj postenoj en la ombro de la preĝejo, tiel ke neniu povis eniri ĝin por ricevi tie konsolon, sen ke ili sciis tion.

Kaj ili konis la kuraciston. Ili konis lian nesciecon, lian kruelecon, lian avarecon, liajn apetitojn kaj liajn pekojn. Ili sciis pri liaj malfertaj operacioj kaj la malgrandaj brunaj penecoj kiujn li avare donis al ili kiel almozon. Ili vidis, kiel liaj kadavroj eniris la preĝejon.

Ĉar la frumatena meso jam delonge finiĝis, tiuj ĉi malicaj ŝercantoj de perfekta kono de siaj proksimuloj sekvis la procesion por vidi, kion faros la pigra kuracisto por indiĝena bebo kiun pikis skorpiono.

La rapidanta procesio fine alvenis ĉe la pordego de la domo de la kuracisto. Ili povis aŭdi la plaŭdetantan akvon, la kantadon de birdoj en ĝiaj kaĝoj kaj la balaadon de longaj balailoj sur la pavimoj. Kaj ili povis flari la rostadon de bona lardo en la domo de la kuracisto.

Kino hezitis momenton. Tiu ĉi kuracisto ne apartenis al lia popolo. Tiu kuracisto apartenis al raso, kiu dum preskaŭ kvar jarcentoj batis, malsategigis, priŝtelis kaj malestimis la rason de Kino, kaj ankaŭ timegis ĝin, tiel ke la indiĝeno tre humile proksimiĝis al lia pordo. Kaj kiel ĉiam, kiam li proksimiĝis al iu de tiu raso, Kino sentis sin malforta kaj timema kaj samtempe kolera. Kolero kaj timo estiĝis kune. Li povus mortigi la kuraciston pli facile ol paroli al li, ĉar la tuta raso de la kuracisto parolis al la membroj de la raso de Kino, kvazaŭ ili estis nuraj bestoj. Kaj kiam Kino levis sian dekstran manon al la fera frapringo, kolero estiĝis en li, kaj la Muziko de Malamiko batis en liaj oreloj, kaj liaj malsekaj lipoj premiĝis kontraŭ liajn dentojn, sed li levis sian maldekstran manon por depreni sian ĉapelon. La fera ringo batis kontraŭ la pordo. Kino demetis sian ĉapelon kaj atendis. Kojotito dolorĝemis en la brakoj de Juana, kaj ŝi dolĉe parolis al li. La procesio haltis proksime de la pordo por povi pli bone aŭdi kaj vidi.

Post kelkej momentoj la pordo malfermiĝis kelkajn colojn. Kino povis vidi la verdan malvarmeton de la ĝardeno kaj la malgrandan plaŭdetantan fontanon tra la pordaperturo. La viro kiu rigardis lin estis iu de lia propra raso. Kino alparolis lin en la praa lingvo.

«La etulo, nia unuenaskita fileto estis pikita de skorpiono,» diris Kino. «Li bezonas la lertecon de resanigisto.»

La pordo refermiĝis iomete, kaj la servisto rifuzis paroli la praan lingvon.

«Momenton,» li diris, «mi iras por informi min,» kaj li fermis la pordon kaj reenŝovis la riglilon. La varma suno ĵetis la ombrojn de la homoj nigre sur la blankan muron.

En sia ĉambro la kuracisto sidis rekte sur sia alta lito. Li surhavis noktosurtuton de ruĝa muara silko, kiu li venigis el Parizo kaj estis nun iomete streĉiĝis sur lia brusto, se la butonoj estis fermitaj. Sur lia sino troviĝis arĝenta plado kun arĝenta poto da ŝokolado kaj malgranda taso el tre fajna ĉina porcelano, tiel delikata, ke li aspektis priridinda, kiam li prenis ĝin per sia dika mano kaj levis ĝin per la pintoj de siaj dikfingro kaj montrofingro, etendante la aliaj tri fingrojn por ke ili ne ĝenu. Liaj okuloj ripozis en pufaj malgrandaj karnaj hamakoj, kaj lia buŝo pendis pro malkontenteco. Li estis dikega, kaj lia voĉo estis raŭka pro la graso kiu kunpremis lian gorĝon. Ĉe lia flanko sur tableto troviĝis malgranda orienta gongo kaj bovlo kun cigaredoj. La mebloj de la ĉambro estis pezaj, malhelaj kaj malgajaj. La pentraĵoj estis religiaj, eĉ la granda kolora foto de lia mortinta edzino, kiu, se mesoj diritaj de la pastro kaj pagitaj el ŝia propraĵo povus fari tion, nun troviĝus en la ĉielo. La kuiracisto mallonge apartenis al la granda mondo kaj lia tuta sekva vivo estis nur nostalgio al Francio. «Tio estis civilizita vivo,» li ofte diris, per kio li volis diri, ke, per siaj malgrandaj enspezoj li kapablis teni edzinon kaj manĝi en restaŭracioj. Li verŝis al si duan tason da ĉokolado kaj diserigis dolĉan biskoton per siaj fingroj.

La pordoservisto eniris tra la malfermitan pordon kaj atendis ĝis lia mastro vidis lin.

«Jes?» demandis la kuracisto.

«Estas malgranda indiano kun bebo. Li diras, ke skorpiono pikis ĝin.»

La kuracisto singarde demetis sian tason, antaŭ ol li lasis sian koleron leviĝi.

«Ĉu mi havas nenion alian farendan ol resanigi etajn indianojn kiuj estas morditaj aŭ pikitaj de insektoj? Mi estas kuracisto kaj ne veterinaro.»

«Jes, mastro,» diris la servisto.

«Ĉu li havas monon?» demandis la kuracisto. «Ne, ili neniam havas monon. Oni supozas, ke nur mi el la tuta mondo devas labori senpage. Demandu, ĉu li havas monon!»

La servisto denove malfermis iomete la antaŭpordon kaj rigardis la atendantajn homojn. Kaj nun li parolis la malnovan lingvon.

«Ĉu vi havas monon por pagi la sinjoron kuraciston?»

Nun Kino metis la manon en sekretan lokon sub sia kovrilo. Li elprenis ofte falditan paperon. Singarde li malfaldis la paperon, ĝis fine videblis ok malgrandaj misformitaj perloj, tiel malbelaj kaj grizaj kiel malgrandaj ulceroj, plataj kaj preskaŭ senvaloraj. La servisto prenis la paperon kaj fermis la pordon, sed tiufoje li ne restis longe for. Li malfermis la pordon ĝuste sufiĉe por redoni la paperon.

«La kuracisto eliris,» li diris. «Li estis vokita por serioza kazo.»

Kaj pro honto li rapide fermis la pordon.

Nun ondo de honto iris tra la tuta procesion. La homoj malaperis unuj post la aliaj. La almozuloj reiris al la ŝtuparo de la preĝejo, la genajbaroj iris hejmen, kaj ankaŭ la aliaj malaperis, ĉar ili ne volis vidi la honton de Kino, kiu longe staris antaŭ la pordo kun Juana ĉe sia flanko. Malrapide li remetis la ĉapelon sur sian kapon. Tiam, senaverte li donis fortan baton sur la pordon per sia pugno. Kun miro li rigardis siajn sangantajn fingrartikojn kaj la sangon kiu fluis inter siaj fingroj.

II

La urbeto troviĝis en la delto de rivero, kie ĝiaj malnovaj stukitaj konstruaĵoj ĉirkaŭbrakis la strandon. La blankaj-kaj-bluj kanuoj, kiuj venis de Najarito kaj estis tiritaj sur la strandon, estis konservataj dum pluraj generacioj danke al la dura konkosimila likimuna stuko, kies preparado estis la sekreto de la fiŝanta popolo. Estis altaj graciaj kanuoj kun kurbigitaj pruoj kaj poboj kaj plifortigitaj centroj, kies mastoj povis esti starigitaj por malgrandaj triangulaj veloj.

La strando estis kovrita per flava sablo, sed ĉe la marrando ĝi estis kovrita per tavolo de rimpitaj konkoj kaj algoj. Malgranda speco de kraboj blovdadis kaj ludadis en siaj truoj en la sablo, kaj en la malprofunda akvo malgrandaj langustoj saltis el kaj en siajn loĝejojn en la gruzo kaj sablo. La marfundo estis kovrita per rampantaj, naĝantaj kaj kreskantaj aferoj. La brunaj algoj ondiĝis en la dolĉa fluo, kaj la verda zostero moviĝis tien kaj reen, dum malgrandaj hipokampoj alkroĉiĝis sur iliaj trunketojn. Makulita boteto - venena fiŝo - kuŝis sur

la fundo inter la bedoj de verdaj algoj, dum akre koloraj kraboj rapide naĝis super ili.

Sur la strando la malsataj hundoj kaj porkoj de la urbo senĉese serĉadis mortan fiŝon aŭ marbirdon, kiu alfloris kun la alta tajdo.

Kvankam la mateno estis ankoraŭ juna, la nebula miraĝo jam malaperis. La necerta aero, kiu pligrandis certajn objektojn kaj malaperigis aliajn, pendis super la tuta Golfo, tiel ke ĉiuj vidaĵoj estis nerealaj, kaj oni ne povis fidi siajn okulojn. La maro kaj la lando havis la akran klarecon kaj svagecon de revo.

Tiel eblis, ke la homoj de la Golfo fidis ĉiujn aferojn de la spirito kaj imago, sed ne fidis siajn okulojn, kiuj montris al ili distancon aŭ klaran bildon aŭ ion optike precizan.

Kontraŭ la estuaro antaŭ la urbo staris grupo da mangloj, dum alia bosketo da mangloj estis nur nebuleca nigreverda makulo. Parto de la malproksima marbordo malaperis en nebuleca lumo, kiu aspektis kiel la akvo de la maro. Oni ne estis certa pri tio, kion oni vidis. Ne estis pruvo, ke tio kion vi kredis vidi, vere troviĝis tie. Tio ne estis stranga por la homoj de la Golfo, kiuj kredis, ke ĉiuj lokoj estis tia. Kuprokolora nebulo pendis super la akvo de la maro, kaj la varmega matena suno brilis sur ĝi kaj igis ĝin vibri per sia blindiganta lumo.

La branĉokabanoj de la fiŝistoj staris malproksime de la strando dekstre de la urbo, kaj iliaj kanuoj estis suprentiritaj ĝis antaŭ la kabanoj.

(Daŭrigote)

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Estintaj aktivaĵoj:

Ĵaŭdon, la 28.01.2016:

Henri Schutters projektis filmon pri Esperanto-aktivaĵojtra la mondo..

Ĵaŭdon, la 05.02.2016:

La hindu Jasho, kiu loĝas en Germanio, prelegis pri la diversaj manieroj skribi kaj uzi ciferoj kaj nombroj.

Estontaj aktivaĵoj:

Ĵaŭdon, la 31.03.2016:

An gvidas skrabloludon en Esperanto.

Ĵaŭdon, la 28.04.2016:

Kantovespero kun Paul Hotterbeekx.

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Eŭropa Unio kaj Esperanto (1) (*La Gazeto, Francio*)
Paĝo 3: Spertoj kaj ideoj el 13 landoj (*Stefan McGill*)
Paĝo 4: La lavendo (*el Espéranto en marche*)
Paĝo 5: Lidja Zamenhof (*Jean Amouroux*):
Paĝo 6: Kurkumo, natura kuracilo (*el Maar natuurlijk*)
Paĝo 7: La fatalisto (novelo de M.J. Lermontov) (*Rusaj noveloj no. 2*)
Paĝo 8: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio
Paĝo 9: Enhavo de tiu ĉi numero

Al ĉiuj legantoj kaj legantinoj de La Ponto mi tutkore deziras feliĉan, prosperan kaj sanan novan jaron 2016!

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lan-go, ne kapablaj paroli la lin-gvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu pro-blemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia gra-matiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.